

Subite ŝi rimarkis antaŭ si tripedan tableton faritan el vitro, kaj jen! kuŝis sur ĝi unu ora ŝlosileto. Tuj la ideo frapis ŝin ke ĝi nepre apartenas al iu el la halpordoj. Sed ho, ve! aŭ la seruroj estis tro grandaj, aŭ la ŝlosileto tro eta, ĉar neniun el ili ĝi malfermis. Tamen, ĉirkaŭirante la duan fojon, ŝi venis al malalta kurteno, kiun ŝi antaŭe ne rimarkis, kaj malantaŭ la kurteno, jen malgranda pordo alta je kvardek kelke da centimetroj; ŝi enŝovis la oran ŝlosileton, kaj (ho, la ĝojo!) ĝi taŭgis.

Malferminte la pordeton, Alicio trovis ke ĝi kondukas en koridoreton ne multe pli ampleksan ol ordinara rat-tunelo. Starigante sin sur la genuoj, ŝi direktis la rigardojn,—tra la koridoreto—en—la plej belan ĝardenon, kiun oni povas imagi. Ho! kiel ŝi sopiris eliĝi tiun malluman halon, kaj ĉirkaŭvagadi inter jenaj helfloraj bedoj kaj dolĉaj fontanoj! Sed tra tiu pordeto ŝi ne povus trairigi eĉ la kapon! “Kaj eĉ se la kapo bone trairus,” ekpensis nia kompatinda Alicio, tre malmulte utilis *tio* sen la ŝultroj! Ho, se mi nur havus la kapablon *teleskopiĝi*. Eble mi povus, se nur mi scius kiel oni komencas la klopodon? Ĉar tiom da eksterordinaraj aferoj jam en tiu tago okazis eĉ ŝi, Alicio ja komencis kredi ke neebla estas preskaŭ nenio. Komprenoble neniel utilis staradi ĉe la pordeto, sekve ŝi reiris al la tablo

kun la ekespero trovi sur ĝi al eble libreton pri la arto teleskopojn ŝi trovis sur ĝi boteleton (“kuŝis tie antaŭe” diris Alicio) kiel ligita ĉirkaŭ la kolo, havante TRINKU MIN per belegaj surskribitajn.

“Tre facile estas diri ‘Trinku la saĝulineto,’ sed mi ne faros tion plena esploro. Mi unue rigardos oni surskribis ĝin per ‘veneno’ antaŭe legis kelke da bonmoralaj infanoj kiuj aŭ mortbruliĝis, aŭ de sovaĝaj bestoj, aŭ suferis de malagrablaĵojn nur simple pro volis atenti ian facilan regulon ofte instruitan, tian ekzemple kiel ke brilvarmega fajrilo povas manon, se oni ĝin tenas tro longe ĉi, ke se oni tre profunde trankviĝi kredeble sangos; kaj neniam se oni trinkos multe el botelo ‘veneno,’ preskaŭ certe estas ke ĝi malordigos la internaĵon.

Do, certiginte ke ĉi tiun boteleton rimarkis per ‘veneno,’ Alicio kurte enhavon. “Ja, tre bongusta ĝi estas (Sajnis al ŝi esti rava miksaĵo farita de sukerita ovaĵo, ananaso, but